

La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-25

n-ro 366

La tiktakado kiu gvidis sciencan revolucion, Christiaan Huygens



Argentina mararmeo
konfirmis eksplodon en
traserĉata regiono de
malaperinta submarŝipo

Kalifornio agnoskis
senkulpecon de viro
malliberigita dum 39
jaroj

Supera Konsilio de Libio
rifuzas amendon de
politika interkonsento

La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin
[Андрей А. Печенкин]

Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.



Farita per:



Scribus
Open Source Desktop Publishing

Argentina mararmeo konfirmis eksplodon en traserĉata regiono de malaperinta submarŝipo
La submarŝipo San Juan malaperis la 15an de novembro kun 44 ŝipanoj p. 03

Supera Konsilio de Libio rifuzas amendon de politika interkonsento
Propono pri plifruigo de la elektoj p. 03

Kalifornio agnoskis senkulpecon de viro malliberigita dum 39 jaroj
Post DNA-analizo oni konkludis, ke li ne kulpas p.04

Afiŝo pri filmo estis konkure vendita kontraŭ pli ol 500 miloj da usonaj dolaroj
Drakulo p. 04

La tiktakado kiu gvidis sciencan revolucion, Christiaan HUYGENS
La kosmo, Saturno kaj pli p. 05

Venki malvirtojn
Drogaĉoj kaj alkoholo p. 08

Hodiaŭe
BA Jin; Eça DE QUEIRÓS; Lope DE VEGA; kaj Sándor RÁKOS p. 09

Argentina mararmeo konfirmis eksplodon en traserĉata regiono de malaperinta submarŝipo

La Argentina mararmeo ĵaŭde [23 nov 2017] konfirmis, ke estis stranga, eksternorma, mallonga, fortega kaj nenuklea eksplodo en la regiono kie la submarŝipo *San Juan* malaperis la 15an de novembro kun 44 ŝipanoj.

Proparolanto de la Argentina mararmeo Enrique BALBI diris al raportistoj, ke la eksplodo estis rimarkita de la usona mararmeo kaj internacia organizo pri malpermeso de nukleaj testoj en Aŭstrio, kiu



havas reton de hidroakustikaj seismaj stacioj.

Informitaj personoj diris, ke hidroakustika anomalio estis produktita proksime de la lasta konata loko de la submarŝipo nur tri horojn post kiam la ŝipo perdis ĉiujn kontaktojn.

Rusia Prezidento Vladimir PUTIN merkrede [22 nov 2017] telefone diris al sia argentina paralelulo Mauricio MACRI, ke la rusia flanko volas helpi al la Argentina mararmeo serĉi la malaperintan

submarŝipon. La du flankoj konsentis starigi mekanismon de komunikado inter la du Ministerioj de Defendo por la serĉado.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Supera Konsilio de Libio rifuzas amendon de politika interkonsento

Merkrede [22 nov 2017] la Supera Ŝtata Konsilio de Libio malakceptis amendon de la Libia politika interkonsento kaj diskutis pri ebleco plifruigi la elektojn.

La Konsilio diris en deklaro, ke ĝi neas konsenton kun la Ĉambro de Reprezentantoj pri la amendo dum la tuniza intertraktado. ili konfirmis, ke la konsilio ne zorgas pri la balotado de la Ĉambro de Reprezentantoj.



Ĝi aldonis, ke ĝi promesas sekvi "la kondiĉojn de Artikolo 12 de la Suplementaj Kondiĉoj, kiuj devigas la mision de la UN konsenti kun la Supera Ŝtata Konsilio kaj la Ĉambro de Reprezentantoj pri la amendo.

La deklaro aldonis, ke la konsilio diskutis proponon pri plifruigo de la elektoj ene de ses monatoj sub la superrigardo de miniatura transira registaro de teknokratoj, kiu estos formita por kontroli la elektojn.


Yu
Ĉina Radio Internacia

Kalifornio agnoskis senkulpecon de viro malliberigita dum 39 jaroj

Merkrede, la 22-an de novembro, la subŝtatestro de Kalifornio (Usono) Jerry BROWN forpardonis Craig COLEY, kiu ĝis tiam estis plenumanta 39 jarojn da malliberigo pro mortigoj, kies okaziginto la aŭtoritatoj nun kredas ne estas li.

Craig COLEY estas 70-jaraĝa kaj li estis kondamnita al ĝismorta malliberigo pro mortigoj en la jaro 1978-a de lia ekskoramikino Rhonda WICHT (24-jaraĝa), kaj ties filo Donald (4-jaraĝa), en la urbo *Simi Valley* (Kalifornio – Usono). Li ĉiam deklaris sin senkulpa.

1978



2017



En 2016 la polico de *Simi Valley* remalfermis tiun juĝaferon post iu emerita agento esprimis dubojn pri la kulpo de COLEY. Post DNA-analizo oni konkludis, ke li ne kulpas.

“Eksterordinara estas la honoreco per kiu COLEY suferis tian longan kaj maljustan malliberigon”, tion asertis la subŝtatestro.

Per komunikaĵo David LIVINGSTONE (policestro) kaj Gregory TOTTEN (publika akuzisito) diris: “Estas tragedia okazo. Virino kaj malgranda infano estis mortigitaj.

Craig COLEY pasigis 39 jarojn en malliberejo pro krimo ŝajne ne farita de li. La vera murdisto aŭ murdistoj ne estis juĝitaj”.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

Afiŝo pri filmo estis konkure vendita kontraŭ pli ol 500 miloj da usonaj dolaroj

Sabate – la 18-an de novembro – Iu malofta afiŝo pri la terurofilmo de la jaro 1931-a, nome *Drakulo*, kies ĉefrolulo estas la hungara aktoro Bela LUGOSI, estis konkure vendita kontraŭ 525 800 usonaj dolaroj en la usona urbo *Dallas*, subŝtato Teksaso.



Laŭ la firmao pri vendado per konkuro “*Heritage*”, tiu estas la plej alta prezo iam pagita por kina afiŝo. Tiu vendita ekzemplero estas unu

el la ununuraj du ankoraŭ ekzistantaj.

Pri la aktoro oni legas en Vikipedio: “Béla LUGOSI (lugoŝi), familinomo Blaskó (*Lugos*, 20-a de oktobro 1882 – 16-a de aŭgusto 1956, Holivudo) estis hungara aktoro plej konata pro sia rolo de *Drakulo* en la Broadway dramo de klasika vampiro-rakonto de Bram STOKER. Poste LUGOSI ludis la saman rolon en la 1931-a filmo. Poste, li havis longdaŭran karieron kiel filmaktoro en Holivudo, ĉefe en hororaj filmoj (*Serio-Frankenstein*)”.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

La tiktakado kiu gvidis sciencan revolucion, Christiaan HUYGENS

Christiaan HUYGENS ['hœyyə(n)s] vivis dum scienca revolucio, dum kiu multaj konceptoj kiujn oni ankoraŭ uzas estis elpensataj. Li mem havis gravan rolon en tiu ondo de malkovroj.

La Libro *“Frankenŝtejno”* (Frankenstein), verkita de la Angla verkistino Mary SHELLEY en la jaro 1816, estas ofte taksata la unua sciencfikcia rakonto. Kvankam ŝia libro ja iĝis la fundamento por tute nova ĝenro, pli ol jarcenton antaŭe, iu alia jam finis sian manuskripton. Temas pri la libro *“Cosmotheoros”*, kiun Christiaan HUYGENS verkis por sia frato kaj finis dum la lastaj jaroj de sia vivo en 1695. La teksto ne temas pri freneza sciencisto, kiu kreas vivon el morto, sed pri la plej granda pasio de HUYGENS: la kosmo. Laŭ siaj propraj observoj kaj tiuj de aliaj astronomoj, li priskribas siajn ideojn pri la strukturo de la kosmo kaj parolas multe pri la enloĝantoj de aliaj planedoj. Li parolas pri tio ke la Tero estas planedo kiel la aliaj en la ĉielo kaj diras ke la aliaj planedoj havas bestojn kaj plantojn kaj ke kelkaj el tiuj bestoj povas pensi racie. HUYGENS ne povintus scii ke kompleksa vivo ne povas ekzisti en la resto de la sunsistemo. Pruvi tion kostis jarcentojn kaj ege kompleksan modernan teĥnologion. Malgraŭ tio, li ja aldonis valorajn konojn en pluraj fakoj,

nome matematiko, fiziko, astronomio kaj eĉ muziko. Tio estas parto pro lia nepriskribebla talento, kiun li jam montris ekde juna aĝo kaj parte pro la politika situacio dum lia vivo kaj la familia medio en kiu li kreskis.




Christiaan HUYGENS vivis dum la Ora Jarcento de la tiama Respubliko de la Sep Unuiĝintaj Provincoj (Nederlando). Li naskiĝis en 1629 en Hago kaj mortis en 1695 en la sama urbo. Tiutempe, la Respubliko estis mondestra potenco kaj ege riĉa. Tiu riĉeco estis la rezulto de la bonŝanca loko de la lando, novaj ideoj pri ekonomio kaj kolonia imperio, sed ankaŭ kiam temas pri aliaj kvalitoj la lando floris. La manko de politika aŭ religia estro igis la riĉajn komercantojn la plej gravaj klientoj por artistoj, kio donis multe da libereco kaj komerco al pentristoj. La libereco de religio kaj manko de cenzuro logis multajn fuĝintojn, inter kiuj estis multe da talento, kaj ebligis liberan sciencan interkomunikadon. Pluraj universitatoj estis fonditaj kaj sciencistoj eltrovis novajn instrumentojn, interalie por ŝipistoj, kaj fundamentajn teoriojn pri natursciencoj. Mallonge dirite, ĝi estis la perfekta medio por kreskigi HUYGENS al lia plena potenco.

HUYGENS estis bonŝanca pro sia familia medio. Li naskiĝis kiel la dua filo de konata poeto kaj diplomato. Lia familio estis altstatusa kaj riĉa, kio ebligis al la kvin gefiloj havi senzorgan infanecon kun multe da spaco por kreski. La familio parolis france kaj latine hejme

por prepari la filojn por iĝi diplomatoj kaj ebligis al ili studi arton, muzikon kaj sciencon. Jam kiel infano HUYGENS pleje ŝatis matematikon kaj lia patro subtenis lin per forĝi kontakton kun gravaj matematikistoj kaj filozofoj. En 1647 la Franca filozofo kaj sciencisto MERSENNE skribis ke, se li tiel daŭrigus, povus enombrigi ARKIMEDON. HUYGENS studis matematikon kaj leĝojn en Lejdeno kaj finis siajn studojn en *Breda*, sed li poste loĝis dum periodoj en Anglio, kie li iĝis membro de la ĵus fondita *Royal Institution*, kaj Francio kie li havis gravan pozicion en la *Académie Royal des Sciences*. Ankaŭ kiam Francio komencis militon kontraŭ la Respubliko, HUYGENS restis en Francio, pro tio ke li taksis sin ekster la politiko. La finon de sia vivo, HUYGENS loĝis en lia urbo de sia naskiĝo.

Dum la deksepa jarcento dum kiu HUYGENS vivis estis scienca revolucio al kiu li multe kontribuis. Multaj el tiuj malkovroj estis meĥanikaj. Por astronomia esplorado kaj transmaraj vojaĝoj oni bezonis tre precizajn horloĝojn, sed oni havis neniun meĥanisman por igi la horloĝojn tiktaki je konstanta ritmo. HUYGENS pensis multe pri la moviĝoj de pendoloj kaj elpensis kiel tiuj povus helpi. Li priskribis ke la periodo kiun pendolo bezonas por iri tien kaj reen estas konstanta, sendepende de kiom da forto oni uzas por ekmovi ĝin. La longo de tiu

periodo nur dependas de la longo de la pendolo kaj la gravita forto. Tiu malkovro ne nur havis praktikajn utilojn, sed ankaŭ ege gravis por fundamenta fiziko. La formulo por la periodo de pendolo estas la plej malnova formulo en fiziko. HUYGENS vidis ke la mondo ĉirkaŭ ni estas malpli hazarda ol ĝi aspektas kaj multe pli ol liaj antaŭuloj li provis matematikigi ĝin. Li priskribis la naturon pere de simpla algebra ekvacio kaj tiel kreis unu el la plej gravaj iloj kiujn fizikistoj havas. Pro tiu kialo, oni povus nomi HUYGENS la unua teoria fizikisto.



Alian meĥanikan malkovron li faris kiam li loĝis en Francio. La reĝo petis lin elpensi manieron por igi la fontanojn de la reĝdomo spruci akvon. Li

elpensis ke oni povus eksplodigi pulvon en tubo kaj uzi tion por movi piŝton. Aliulo poste kombinis tion kun vaporo por krei la vapormaŝinon, kiu estis la fundamento de la industria revolucio.


Lia plej granda pasio tamen, estis astronomio. Jam kiam li estis juna li kreis teleskopon de kvar metroj kun lia frato. Ili ankaŭ kreis siajn proprajn lensojn per tre bone prilabori la surfacon de vitro per sablo por forigi materialon. Poste HUYGENS konstruis la unuan sentuban teleskopon, de 66 metroj. Se ĝi havintus tubon, ĝi verŝajne ne povus subteni sian propran pezon. Pere de siaj akraj instrumentoj li kapablis fari multajn malkovrojn. Gravaj

ekzemploj estas la plej granda luno de Saturno (kiun oni nomis Titano poste), glacio sur Marso kaj solvi la misterion pri la strukturo ĉirkaŭ Saturno. Antaŭaj astronomoj jam divenis ke la objektoj estis grandaj diskoj aŭ "oreloj" ĉirkaŭ la planedo, sed HUYGENS malkovris ke li rigardis ringon kiu ĉirkaŭiras la tutan planedon sen tuŝi ĝin. Finfine li ankaŭ aplikis la matematikon kiun li eltrovis por priskribi liajn astronomiajn malkovrojn, kio donis al li avantaĝo kontraste al antaŭaj astronomoj.

Kompreneble HUYGENS faris multe pli da malkovroj, kiel la unuajn paŝojn al infinitezima kalkulo (kvankam li laboris multe pli geometrie ol LEIBNIZ kaj NEWTON), novan muzikteorion kiel sistemon kie okto enhavas 31 malsamajn tonojn kaj la teorion kiu priskribas lumon kiel ondon, kiu poste iĝis grava parto de la moderna kvantuma meĥaniko. Li eĉ pensis pri ekstertera vivo kaj eksternsistemaj planedoj, kvankam li ne havis la ilojn por testi tiujn ideojn. Li vivis antaŭ sia tempo kaj estis sendube unu el la plej influaj kaj inteligentaj homoj kiuj iam ajn vivis. Por ekscii ĉu li ankaŭ pravis pri eksterteruloj, ni simple atendu.

Unu restaĵo el la tempo de HUYGENS estas la horloĝego de la *Hooglandse Kerk* en Lejdeno. La horloĝo de tiu preĝejo venas el 1609 kaj estis farita de sinjoro HOPCOPER, sed ĝia precizeco ne

estas pli ol kvaronhorro. Post 1657, kiam HUYGENS kreis la pendolan horloĝon, oni modifis la horloĝegon per pendolo de 6,40 metroj. Oni povas vidi ĝin funkcia kun klarigo en la Nederlanda (vidu).



Por ekscii kiel mikrotona muziko laŭ la sistemo de HUYGENS sonas, oni povas aŭskulti la orgenon de la Huygens-Fokker Asocio (vidu).

La traduko de *Cosmotheoros*, la lasta libro kiun HUYGENS verkis, legeblas enrete senkoste. Temas pri la Nederlanda traduko kiu verkigis en 1754. Legi verkon pri temoj kiel eksternsistemaj planedoj kaj eksterteruloj en tiom malnova stilo estis tre interesa sperto al mi (vidu).

Pro tio ke HUYGENS tiom multe kontribuis al nia kompreno de Saturno, ties ringojn kaj Titano, la Titan-sondilo kiu kunflugis kun la Cassini-misio havis la saman nomon. Oni povas legi pli detale pri la malkovroj de tiu sondilo en antaŭa blogafiŝo (vidu).

Frank VAN HERTROOIJ
scivolemo.wordpress.com
Kun subteno de ISAE

Venki malvirtojn

De frua aĝo oni lernas, ke kruela estas la destino, kiun drogaĉoj kaj alkoholo prezentas al la homoj. Ĝi ne nur ruinigas la vivon de la uzantoj, sed tiun de ilia tuta familio. La iluzia sento de bonfarto kaj eŭforio tragike evidentiĝas laŭ la iom-post-ioma degradiĝo de la Animo kaj de la korpo de drogmanuloj.



Bedaŭrindaj konsekvencoj klare aperas antaŭ ĉies okuloj. Sufiĉas vidi, kiom da viktimoj meze de aŭtomobiltrafiko, la malfeliĉon ene de familioj, la ege multekostajn elspezojn al la sanservo. Se menciis nur alkoholon, laŭ Ministerio de Sano, oni kalkulas, ke la kvanto da toksomaniuloj estas inter 10% kaj 15% el la tutmonda loĝantaro.

Paralele al publikaj registaraj decidoj kaj medicinaj zorgoj al uzantoj, kiuj batalas kontraŭ tia ĥemia toksigo, oni ne rajtas flanken lasi ĝustan valorigon de la familio. En ĝi oni trovas solvon al multaj problemoj, kiuj nuntempe afliktas la Homaron.

Dum stratmanifestacioj kaj disdonado de flugfolioj, per prelegoj, per radio kaj televido, ni orientas gepatrojn kaj respondeculojn pri la nepre necesa atento, kiun oni devas teni rilate la ĉiutagan vivon de siaj gefiloj, iliaj geamikoj, duboj, frekventataj lokoj. Krome, estas esence grava la ĉeesto de Ekumena Spiriteco en la dialogo inter la familianoj.

kiuj falis en tiajn kaptilojn de pasikutimo, aŭ klopodas preventi tiujn malbonaĵojn, meritas plenan apogon kaj stimulon. Batali kontraŭ tio, kio malbonfaras al homoj ankaŭ tio estas

ĝusta helpo. Karitato ne estas nur limigita al la tro strikta koncepto, al kiu iuj homoj emas ĝin enmeti. Temas pri plej alta politiko. Ĝi prilumas la Spiriton de civitanoj. Ĝi flamigas la kuraĝon de homoj. Kial perdi la esperon? La unua viktimo de malespero

estas la senesperulo mem.

Respekto al la Vivo

Problemoj estas solveblaj, kiam la homoj efektive pretas solvi ilin. Tio temas pri respekto al la dieca privilegio vivi. Pro tio, ĉi tie perfekte konvenas ĉi tiu penso de Henry FORD (1863-1947), kiu iam difinis Bonan Volon kiel la plej grandan forton en la Vivo: "Tempo de riĉeco ne aperas hazarde. Ĝi aperas kaŭze de multa klopodado kaj obstino."

Jen estas ia konscio nepre necesa en iu ajn laborkampo. Tiun saman sindediĉon ni devas plenumi en batalado kontraŭ drogaĉoj, kiuj malfeliĉigas multajn familiojn, kaj en la koncerna rekapabligo de drogaĉuloj. Fumkokaino, alkoholo, tabako, se oni citas nur kelkajn, estas do bedaŭrindaj har-magedonoj, kiujn oni devas venki.

Adaptite el
paivanetto.com/eo

Iniciatoj, kiuj celas homece prizorgi tiujn,



BA Jin

BA Jin ([ba ĝin] , ĉine: 巴金 , esperante **Bakin** ; naskiĝis la **25-an de novembro 1904**, en **Ĉengduo**, mortis la **17-an de oktobro 2005**, en **Ŝanhajo**; vera nomo nasknomo: **Lǐ Yaotang** (ĉine: 李堯棠); adolta nomo: **Lǐ Fèigān**, ĉine: 李芾甘) estis ĉina verkisto kaj esperantisto.

En Esperanto aperis pluraj tradukoj.

Vikipedio

Eça DE QUEIRÓS

José Maria de Eça DE QUEIRÓS (aŭ **Queiróz** laŭ la malnova portugala ortografio, naskiĝis en **Póvoa de Varzim**, la **25-an de novembro 1845** kaj mortis en **Parizo**, la **16-an de aŭgusto 1900**), estis portugala verkisto.

En Esperanto aperis: *Familio Maja*; *En la muelejo*; *José Matias*.

Vikipedio



Lope DE VEGA

Lope DE VEGA (kompleta nomo **Lope Félix de Vega Carpio**) (naskiĝis la **25-an de novembro 1562** en **Madrido**, mortis la **27-an de aŭgusto 1632**) estis hispana verkisto kaj la plej fama dramaturgo de la Hispana ora epoko.

Vikipedio

Sándor RÁkos

Sándor RÁkos, [ŝAndor rAkoŝ], hungare **Rákos Sándor**, Esperante **Aleksandro Rákos** estis hungara poeto kaj tradukisto.

En Esperanto aperis: poemo en *Hungara Antologio*.

Vikipedio

